AAA v5.4.7

por operaciumo Vindozo®

© 1997–2024 Mario Corsolini

URL: www.oipaz.net

eMail: mario@corsolini.net

Enhavo

Paĝo

Titolo 1

Enhavo 2

1. Enkonduko 3

2. Permesilo 3

3. Sistemaj postuloj 3

4. Instalado 3

5. Instrukcioj por uzado 4

6. Malinstalado 4

7. Komentoj, sugestoj, cimo-raporto 4

8. Listo de la versioj eldonitaj 5

9. Dankoj 9

1. Enkonduko

AAA estas simpla, rapida kaj pova ilo por konservi kaj mastrumi tekstajn notojn. Oni povas montri/kaŝi per simpla klako sur ĝia piktogramo en la Atentigaero. AAA povas konservi historion de la Poŝoj de Vindozo, kalkuli statistikojn, mastrumi multoblajn poŝojn, agordi alarmilojn, ordigi, konformigi, formati, ekigi aplikaĵojn... kaj multe multe pli!

2. Permesilo

AAA estas distribuita kun permesilo Creative Commons Atribuite - Nekomerce - Nemodifite 4.0 Tutmonda (CC BY-NC-ND 4.0).[1]

3. Sistemaj postuloj

AAA funkcias en 32 aŭ 64 bitaj operaciumo Vindozo (versio 7 aŭ sekvantaj) kaj ne bezonas aparatarajn rimedojn.

4. Instalado

AAA bezonas neniun instalado: sufiĉas malkompaktigi ĝin kaj rulu la dosieron "AAA.exe"!

Por ĝisdatiĝi version malnovan (5.0.0 aŭ posta): fermu AAAn (se rulas) kaj anstataŭigu la malnovajn dosierojn kun la novaj. Ĉiuj la agordoj kaj datumoj de AAA estos plutenitaj.

Ĝi estas tre rekomendinda krei ŝparvojo al la AAA.exe dosiero kaj fiksi sian piktogramon en la Atentigareo kiel ĉiam videbla.

Sur malnovaj versioj Vindozaj povus necesi elŝuti kaj instali la Microsoft® .NET Framework 4.8.[2]

[1] https://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/4.0/deed.eo

[2] https://dotnet.microsoft.com/en-us/download/dotnet-framework/net48

5. Instrukcioj por uzado

Menuoj kuntekstaj: la piktogramo en la Atentigareo, la strio de langetoj, kestoj tekstaj kaj alarmiloj havas sian propran ŝprucmenuon, kiu montras la eblojn respektive disponeblajn.

Parametroj por la komandlinio:

Parametro		**Funkcio**
`/?`	`/h`	montras la fenestron "Pri AAA" en lingvo angla;
`/?:eo`	`/h:eo`	montras la fenestron "Pri AAA" en lingvo internacia;
`/?:it`	`/h:it`	montras la fenestron "Pri AAA" en lingvo itala;
`/m`		AAA komenciĝas minimumigata en la Atentigareo;
`/nocheck`		malaktivigas la kontrolo por ĝisdatoj.

Majusklaj kaj minusklaj literoj estas indiferentaj. Ĉiu alia parametro estos ignorata.

Ĉiuj aliaj ebloj kaj funkcioj estu mem-klarigan... se ili ne estus, ni akceptas volontulojn por skribi pli kompletan manlibron!

6. Malinstalado

Fermi AAA (se ĝi ruliĝas), forigi la dosierujon kie ĝi estis malpakita kaj ĉiu ŝparvojon kreita. Tio malinstalados tute AAA. :-(

Se vi devis instali la .NET Framework 4.8, la ĉi-lasta povas esti forigita (se ĝi ne estas uzata de aliaj aplikoj) per la kutima direktilo de la "Programoj kaj Trajtoj" en la stirpanelo.

7. Komentoj, sugestoj, cimo-raporto

Ĉiuj komentoj, sugestoj kaj (plejparte) cimo-raporto estas bonvenataj kaj devas esti sendataj al `mario@corsolini.net`

Oni rekomendas specifai "AAA" en la temo de la mesaĝo, kaj raporti ankaŭ la version kaj kelkaj informoj pri la Vindoza medio uzata.

AAA estas plurlingva apliko: bonvolu kontakti min se vi pretas traduki ĝin en alian lingvon!

8. Listo de la versioj eldonitaj

- Versio **5.4.7** — 5a de januaro 2024
  - Korektita agorda ŝarĝiĝo: se la fenestro "Serĉu kaj anstataŭigu" estas ekster la ekrano, ĝi estas aŭtomate enportita.
- Versio **5.4.6** — 21a de januaro 2023
  - Ĝisdatigita Microsoft .NET Framework al versio 4.8.
  - Estetikaj korektetoj.
- Versio **5.4.5** — 5a de februaro 2021
  - Denove tradukita por sistemoj kaj 32- kaj 64-bitaj.
  - Korektita agordo de lanĉa langeto: iam listo de langetoj malplenis.
  - Korektitaj ligiloj en fenestro "Pri AAA": ili iam kreis (ripareblan) escepton.
- Versio **5.4.4** — 19a de januaro 2021
  - Korektita agorda ŝarĝiĝo: se la ĉefa fenestro estas ekster la ekrano, ĝi estas aŭtomate enportita.
- Versio **5.4.3** — 1a de januaro 2020
  - AAA povas reŝarĝi la dosieron del la datenoj se ekstere ŝanĝita.
  - Restarigita la administrado de la tiparoj e de la fonkoloroj en la fenestro "Alarmiloj".
- Versio **5.4.2** — 11a de novembro 2019
  - Aldonita konservas kaj restarigas lokon de AAA en la menuo "Elektajoj".
  - Forigita "AAA Always Alive".
- Versio **5.4.1** — 11a de novembro 2018
  - Aldonita la alternativa startilo "AAA Always Alive".

- Versio **5.4.0** — 21a de junio 2018
  - Aldonita la ebleco montri kaj kaŝi AAA-on per ĝenerala personigita fulmoklavo.
  - Aldonita aŭtomata anstataŭigo de tekstopartoj ene de la Poŝo Vindoza.
  - Ŝanĝita la konduto de "Montru AAA-on": la fenestro bildigatas tuj eĉ se ne antaŭe malplejigita.
  - Korektita la mastrumado de Poŝo Vindoza: akiro de iuj ne tekstaj datenoj povis bloki AAA-on.
  - Estetikaj korektetoj.

- Versio **5.3.3** — 19a de januaro 2018
  - Cimo riparita: Visual Studio aŭtomate pligrandigis ĉiun menuan ikonon de AAA.

- Versio **5.3.2** — 1a de januaro 2018
  - Estetikaj korektetoj.

- Versio **5.3.1** — 21a de decembro 2017
  - Aldonita la administrado de malfruoj ce lanco de apljkaja grupo.
  - Anstatauigita ReadMe.EO.txt per ci tiu ReadMe.EO.pdf (agrable komponita per LaTeX) kaj sekve fasonita la "Pri AAA" fenestro.
  - Korektita la administrado de linisaltoj en pluraj notoj: tiuj en ne-Vindoza formato ne agnoskitis.
  - Korektita la komputado de geometria mezvaloro en la "Analizu nombrojn" fenestro: kaze de grandegaj nombroj, gi rezultis senfina.
  - Modifita la sablono de eldona versio adoptinte la kutiman modelon: pli granda.pli malgranda.revizio.
  - Estetikaj korektetoj.

- Versio **5.3.0** — 3a de oktobro 2015
  - Aldonita la sekcio "Lanĉo de aplikaĵoj" al la menuo piktograma en la Atentigareo.
  - Aldonitaj la statistikoj uskleco-blindaj en la "Statistikoj" fenestro.

  - Aldonitaj la statistikoj pri la enhavo de la Poŝoj de Vindozo en la "Statistikoj" fenestro.
  - Aldonita menuero por forigi ĉiujn la multoblaj poŝoj.
  - Aldonita la klavo <Esk> pot fermi la menuon pri ĉieaj klavkombinoj de la multoblaj poŝoj.
  - Plibonigitaj iuj praagordoj.
  - Korektita la pravalorigo de la duarangaj fenestroj kiam AAA estas uzata angle.

- Versio **5.2.0** — 1a de oktobro 2014
  - Aldonitaj la poŝoj multoblaj.
  - Cimo riparita: dum la unua lanĉo de AAA iuj menueroj ne estis pravalorigitaj.
  - Cimo riparita: la historio de la poŝo iam produktis escepton (ne fatalan).
  - Cimo riparita: la statistikoj de paĝoj enhavantaj nur maplenajn liniojn produktis escepton (ne fatalan).
  - <Tabo> klavo ree estas aktiva en la ĉefa fenestretoj.
  - Plibonigita administrado de la vortaroj.
  - Estetikaj korektetoj.

- Versio **5.1.2** — 21a de junio 2014
  - Aldonitaj la statistikoj por la teksto selektita en la fenestro "Statistikoj".
  - Aldonita butono por aktivigi/malaktivigi la alarmilojn en la fenestro "Alarmiloj".
  - Aldonita la indiko de la nombro de alarmiloj aktivaj/entutaj en la menuero "Alarmiloj".
  - Plibonigita la interfaco por administri daton kaj horon de la alarmilojn en la fenestro "Alarmiloj".
  - Estetikaj korektetoj.

- Versio **5.1.1** — 13a de junio 2014
  - Aldonita la videbligo de la koordinatoj kursoraj.
  - Aldonita ligilo al la permesilo en la fenestro "Pri AAA".

  - La fenestro averta de la alarmoj nun estas ĉiam en malfono.
  - Korektita la aktivigo de la alarmoj: se la uzanto ne fermis la fenestron avertan ene de unu minuto, la alarmo estis ripetita kaj escepton produktiĝis (ne fatalan).
  - Korektita la administrado de iuj butonoj klavkombinaj: estis aktivigita la konservo eĉ se ne estis ŝanĝoj.
  - Estetikaj korektetoj.

- Versio **5.1.0** — 20a de marto 2014
  - AAA estas nun aplikaĵo je sola instanco.
  - Aldonita: kontrolo aŭtomata por ĝisdatoj en la fenestro "Pri AAA".
  - Plibonigita la subprogramo "Konservu": nun ĝi estas pli efika kaj preskaŭ 50 fojoj pli rapida.
  - Cimo riparita: alarmoj estis malaktivaj ĝis la unua klako sur la menuo ĉefa de AAA.
  - Cimo riparita: restarigo de sekurkopio ne funkciis taŭge.
  - Cimo riparita: iuj kontrolij estis lokitaj malĝuste se la tipargrandecon Vindozan estis pli granda ol 100%.
  - Cimo riparita: "Langeto interŝanĝu" subprogramoj kelkfoje kolapsis.
  - Cimo riparita: `/h` kaj `/?` ne funkciis taŭge.
  - <Tabo> klavo nun estas aktiva en la ĉefa fenestretoj.
  - La menuero "Kaŝu" estas nun neaktiva kiam formo modala estas montrata.
  - Fermi formon modalan plutenas nun AAAn antaŭ la aliaj fenestroj.
  - Estetikaj korektetoj.

- Versio **5.0.0** — 5a de marto 2014
  - Reskribita el nulo per Visual Studio Express: kelkaj trajtoj aldonitaj, aliaj forigitaj. AAA estas tute nova programo kaj ne estas pli kongrua kun la notoj savitaj el antaŭaj versioj.

- [...]
  (la kompleta listo, en la angla nur, de malaktualaj versioj de AAA estas enhavata en la dosiero WhatsOld.txt)
- Versio **1.0.0** — 10a de aŭgusto 1997
  - Unua versio distribuita publike.

9. Dankoj

Dankon al Laura Venturelli kaj Filippo Botta por la traduko en Esperanto.

La ĉefa piktogramo de AAA venas de la kolekto Shiny Icons de Double-J Design,[3] la plejparto de la aliaj piktogramoj venas de la kolekto Farm-Fresh de FatCow Web Hosting.[4]

La aŭtoro deziras danki ĉiu ajn, kiu estis helpanta kun ideoj kaj valorajn sugestojn, kune kun la programaroj testantoj!

Kaj, evidente, dankon al Laura kaj al ŝia pacienco!!

Ĝuu!!!

[3] https://www.doublejdesign.co.uk/

[4] https://www.fatcow.com/free-icons